CIRCULATION: 2,000 Copies

Filipina Esperantisto

Organ of the Philippines
Esperanto Association

Entered at Post Office at Manila as Second Class.

Vol. I, No. 8 MARCH, 1908 20 centavos

Published by the Executive Committee of the Philippines Esperanto Association at McCullough Building : :

Adreso: P.O. Box 326, Manila

Annual Subscription ..... ₱ 2.00
Unu peso (₱1.00) egalvaloras 1026 spesojn

JARA ABONO—EKSTERLANDE: Ni akceptas deksep internaciajn respond-kuponojn.

NOTES AND COMMENT

The Carnival held in this city on the opening days of this month proved a great success, and the promoters are so encouraged by the result that they intend to commence at an early date their preparations for next year's pageant on an even more elaborate scale.

Two esperantists occupied the thrones of the Occident and the Orient. Captain Langhorne as King of the Occident and Miss Purita Villanueva as Queen of the Orient. We are printing a portrait of the latter in costume on our frontispiece in this issue. We cannot refrain from remarking upon the beauty of the piña fabrics—products of the native looms of these islands—when given so graceful a setting. The photo was taken by Señor J. Reyes.

In this issue we are commencing a grammar of Esperanto in the Tagalog language, a similar space will be devoted to it in future issues, and when completed will be printed in book form.

We are devoting many pages to propaganda and are forced through lack of space to hold over much interesting correspondence; also articles dealing with the movement abroad; reviews of publications; a communication on technical and scientific words from the "Scienca Oficejo," Geneva; continuation of "La Muroj de Manila'o" as well as the list of Esperanto gazettes.

Our *role*, at this stage especially, must be one of propaganda, and we leave the ably edited all-Esperanto journals to supply our few advanced readers with literature more varied.

In this connection we would like to impress upon members that they subscribe to one or more of these special journals for the excellent reading they afford as well as for encouragement to the movement it helps to give.

We will gladly forward subscriptions to any journal as published in our previous issues.

"The Esperanto Instructor" is now under the editorship of Dr. O'Connor. This little monthly may be ordered through us for one peso per annum. We have a few sample copies that we will send free on application.

We have also a few sample copies of the "American Esperanto Journal" and "British Esperantist" that we will send on request. "Tra la Mondo," the illustrated all-esperanto journal, is specially recommended; the subscription price is 3.20 spesmilos, equivalent to ₱3.20.

EVENING CLASSES

Those of our members who desire to attend classes for Esperanto are informed that Mr. Edgar McClellan is now holding meetings for mutual study at the Konsulejo, Hotel de France.

Spanish class at 6:30 to 7:30 p.m. on Mondays, Wednesdays and Thursdays; American class at 7:30 to 8:30 on the same evenings.

During the vacation the Filipino class at the Liceo de Manila will be discontinued. Mr. McClellan will however open up another class for Filipinos in Intramuros, and requests those wishing to attend to communicate with him at P. O. Box 636.

Digitized by Google

Letero de D-ro L. L. Zamenhof

Al Ĉiuj Esperantistoj



D-RO L. L. ZAMENHOF

Varsovio, la 18an de Januaro 1908.

En la jaro 1900, kiam la esenco de la internacilingva afero estis ankoraŭ tro malmulte konata kaj la mondo pensis, ke ekzistas diversaj lingvoj internaciaj, kiuj inter si batalas, sinjoroj Couturat kaj Leau en Parizo fondis "Delegacion," kies celo estis: peti la Internacian Ligon de Akademioj, ke ĝi esploru, kiu el la ekzistantaj artefaritaj lingvoj taŭgas plej bone por la rolo de lingvo internacia, aŭ elekti mem komitaton, kiu esplorus tiun ĉi demandon. Kvankam, de la jaro 1900 ĝis nun, la vivo jam *mem* solvis la diritan demandon, tamen, por plenumi sian promeson, la Delegacio, en Oktobro 1907, kunvokis komitaton, kiu devis elekti lingvon internacian. Sed bedaŭrinde la komitatanoj ne ĝuste komprenis sian taskon, kaj, elektinte Esperanton, ili decidis fari en ĝi *reformojn*, forgesante, ke tia tasko tute ne estis kaj neniam povis esti komisiita al ili. Tiu ĉi tre bedaŭrinda decido estis kaŭzita de kelkaj tre gravaj malkompreniĝoj:

1.o Oni forgesis, ke la afero de lingvo internacia estas nun ankoraŭ en la stato de *propagando;* ke la mondo ne akceptas lingvon internacian ne pro tiuj aŭ aliaj ĝiaj *detaloj*, sed nur pro malkonfido al la *tuta* afero; ke sekve nun ĉiu vera amiko de lingvo internacia devas absolute silenti pri siaj personaj gustoj kaj gustetoj, kaj ni ĉiuj devas antaŭ ĉio labori en plej severa *unueco*, por ke ni akiru por nia afero la *konfidon* de la mondo. Kiam nian aferon prenos en sian manon ia granda *forto* (ekzemple la registaroj de la ĉefaj landoj), kiu per sia potenco povos doni al ni ne senvalorajn tro memfidajn vortajn promesojn, sed plenan *garantion*, ke ĝi alkondukos nian aferon al la celo *pli certe* ol ni kaj ke ĝi ne faros facilanime iajn decidojn, antaŭ ol ili *tute mature* kaj perfekte estos pripensitaj kaj praktike *elprovitaj* kaj *fiksitaj*, tiam ni povos konfide transdoni al tiu potenca forto la sorton de nia afero; sed se *privataj* personoj, kiuj havas nek ian aŭtoritaton, nek ian forton, postulas, ke ni forlasu la vojon, kiun ni pacience kaj sukcese sekvis en la daŭro de multaj jaroj, kaj ni komencu plej danĝerajn rompajn eksperimentojn, ĉiuj veraj esperantistoj energie protestos. Nun, kiam ni estas ankoraŭ tro malfortaj, ni povas atingi nian celon nur per *severa disciplino* kaj per *absoluta unueco;* alie ni pereigos nian tutan aferon por ĉiam, por *ĉiam;* ĉar kiu scias, kun kia grandega malfacileco kaj per kia superhome pacienca dudekjara laborado de multaj miloj da personoj estas atingita la nuna favora rilato de la mondo al nia afero, tiu komprenas, ke se, pro interna malpaco, Esperanto nun pereus, la mondo jam neniam, *neniam* volos ion aŭdi pri ia nova lingvo internacia, eĉ se ĝi estus ne senviva teoria produkto de multaj reciproke malproksimaj kapoj, sed la plej genia kreitajo! Mi ripete memorigas tion ĉi al la reformistoj, mi ripete kaj insiste petas ilin, ke ili pripensu, kion ili faras, ke ili ne ruinigu tiun grandan kaj gravan aferon por kiu ni ĉiuj laboras kaj por kies ebla pereo la posteuloj iam severe nin juĝus.

2.o Oni forgesis, ke ne sole eĉ en sia nuna formo Esperanto en la praktiko montriĝis perfekte taŭga por sia rolo kaj ke plibonajo povas fariĝi danĝera malamiko de bonajo, sed ke se eĉ *efektive* aperus la neceseco plibonigi Esperanton, la solan kompetentecon kaj rajton por tio ĉi havas ne flankaj personoj, sed nur la *esperantistoj mem.* Kaj en ĉiu momento, kiam plibonigoj montriĝos efektive necesaj

Digitized by Google

kaj ĝustatempaj, la esperantistoj tre facile *povas* ilin efektivigi. Ĉar ĉiu rakontado pri ia baro, kiu n kvazaŭ prizentas la Bulonja Deklaracio, aŭ pri ia kvazaŭa senviveco kaj senforteco de nia Lingva Komitato, estas simpla malvero, per kiu oni penas fortimigi de ni tiujn personojn, kiuj ne konas bone la staton de la afero j.

Ĉiu, kiu legis la antaŭparolon de la "Fundamento de Esperanto," scias tre bone, ke ĝi ne sole ne prezentas ian baron kontraŭ la evolucio de la lingvo, sed kontraŭe, ĝi donas al la evolucio tian grandegan liberecon, kiun neniu alia lingvo iam posedis eĉ parte. Ĝi donas la eblon, se tio estus necesa, iom post iom eĉ ŝanĝi la tutan lingvon ĝis plena nerekonebleco! La sola celo, kiun la Fundamento havas, estas nur: gardi la lingvon kontraŭ *anarkio*, kontraŭ reformoj *arbitraj* kaj *personaj*, kontraŭ danĝera *rompado*, kontraŭ forjetado de malnovaj formoj antaŭ ol la novaj estos sufiĉe *elprovitaj* kaj tute definitive kaj sendispute *akceptitaj*. Se la esperantistoj ĝis nun tre malmulte faris uzon de tiu granda libereco, kiun la Fundamento al ili donas, ĝi ne estas kulpo de la Fundamento, sed ĝi venas de tio, ke la esperantistoj komprenas tre bone, ke lingvo, kiu devas trabati al si la vojon ne per ia potenca dekreto, sed per laborado de amasoj, povas disvolviĝi nur per tre singarda vojo de natura *evolucio*, sed ĝi tuj mortus, se oni volus ĝin disvolvi per kontraŭnatura kaj danĝerega vojo de *revolucio*.

Cetere, se la Bulonja Deklaracio efektive prezentus ian malbonajon aŭ neprecizajon, kiu do malpermesas, ke iu proponu ĝian ŝanĝon aŭ eĉ ĝian tutan forigon? Jes, tiuj sinjoroj, kiuj suk la influo de agitantoj diras, ke la "Fundamento" prezentas "eternan baron kontraŭ la evolucio de Esperanto," parolas pri afero, kiun ili tute ne konas!

Ĉar la Lingva Komitato ĝis nun faris ankoraŭ neniun rompon en la lingvo, tial la reformistoj ĝin kulpigas, ke ĝi estas senviva, senforta, senaŭtoritata, sentaŭga! Sed se ĝi estas malbona, kiu do malpermesas, ke la esperantistoj mem ĝin reorganizu? Anstataŭ semi malkontentecon, malpacon kaj ribelon, ĉu ne estus pli bone, se iu el la malamikoj de la nuna Lingva Komitato prezentus projekton de reorganizo de tiu ĉi komitato? Se la projekto estos bona, ĝi ja certe estos akceptita; mi povas eĉ sciigi la malkontentulojn, ke la prezidanto de la Komitato mem preparas nun projekton de reorganizo, kiun li intencas prezenti al la plej proksima kongreso. Per vojo de paco kaj harmonio ni ĉion povas krei, per vojo de malpaco kaj ribelo ni ĉion nur detruos.

Por fari reformojn en Esperanto, la "Delegacia Komitato" ricevis komision nek de la esperantistoj, nek de siaj propraj delegintoj (kiuj ne sole ne donis, sed eĉ ne *povis* doni tian strangan komision); siajn proprajn, de neniu rajtigitajn postulojn de reformoj—kiuj apogis sin sur zorge kolektitaj voĉoj de kelka nombro da malkontentuloj, sed tute ignoris la opinion de multaj dekmiloj da personoj kiuj estas kontraŭ ĉiuj ŝanĝoj—la Delegacia Komitato prezentis al la esperantistaro en formo tre ofenda, postulante, ke la tuta multemila kaj longe laborinta esperantistaro akceptu la decidojn, kiujn kelkaj flankaj personoj ellaboris en la daŭro de 8-10 tagoj; ili eĉ malhumile postulis, ke tiuj decidoj estu akceptataj *tuj*, ne atendante la esperantistan Kongreson; tial la sola respondo, kiun ni devis doni al la postulantoj, estus simpla kaj tuja rifuzo. Sed ĉar troviĝis personoj, kiuj per ĉiuj eblaj rimedoj komencis grandan kaj lertan agitadon inter ĉiuj esperantistoj, penante per ĉiuj fortoj ruinigi la harmonion, kiu ĝis nun regis inter ni, penante semi malpacon kaj malkontentecon kaj kreĉi al ĉiu aparte, ke ĉiuj postulas reformojn, nur la ĉefoj kontraŭstaras; kaj ĉar ni komprenis tre bone, kiel pereiga fariĝi por nia tuta afero ĉia publika malpaco kaj skismo, precipe se ĝi al la nenion scianta publiko estas tute malvere prezentata kiel "deziro de multaj societoj"; tial ni en la daŭro de tri monatoj faris ĉion, kion ni povis, por kvietigi la ribelantojn en ia paca maniero. Ni multe korespondis kun ili, penante klarigi al ili, kiel danĝerega ilia agado estas por tiu afero, kies amikoj ili sin kredas; ni prezentis la demandon al la voĉdonado de ĉiuj membroj de la Lingva Komitato; kaj kiam la Lingva Komitato rifuzis akcepti iliajn strangajn kaj tro grandajn postulojn, ni eĉ decidis, ke ni *mem* en nia propra nomo prezentos al la esperantistoj iliajn plej ĉefajn postulojn, kvankam ni tute ne vidas en ili ian necesajon, sed ni nur deziris, ke ĉio estu farata sen rompado, per vojo laŭleĝa; ke ĝis la komuna akcepto la novaj formoj estu rigardataj ne kiel devigaj, sed nur kiel permesataj, kaj ili ricevu forton nur tiam, kiam la Lingva Komitato ilin aprobos kaj Kongreso esperantista donos al ili sian sankcion.

Sed ĉiuj niaj penoj de pacigo nenion helpis. La postulantoj respondis, ke por ili ne estas aŭtoritata nia Lingva Komitato, nek nia Kongreso, kaj ili rezervas al si plenan liberecon de agado.


Tiam ni estis devigitaj rompi ĉiun intertraktadon kaj sciigi, ke la "Delegacia Komitato" por ni plu ne ekzistas. La ĉefa la propra tute preciza programo de la "Delegacio," la Komitato ricevis de siaj delegintoj la

Digitized by Google

komision nur *elekti* lingvon; de la momento, kiam tiu elekto estis farita, la "Delegacia Komitato" ĉesis ekzisti kaj restis nur kelkaj *privataj* personoj, kiuj—laŭ siaj propraj vortoj—fariĝis nun esperantistoj. Sed kiam tiuj kelkaj novaj esperantistoj, kiuj aliĝis al Esperanto nur antaŭ malmultaj semajnoj, ekdeziris dikti leĝojn al la tuta popolo esperantista, kiu laboras jam pli ol dudek jarojn, kaj ĉiuj niaj admonoj nenion helpis, tiam ni simple lasis ilin flanke.

Ni estas konvinkitaj, ke tiuj kelkaj scienculoj, kiuj lasis sin entiri en reton, baldaŭ komprenos la eraron, kiun ili faris; ili baldaŭ komprenos, ke nia gravega kaj malfacilega afero povas atingi sian celon *nur per severa unueco;* kaj pro la bono de ilia amata ideo ili baldaŭ discipline aligos siajn fortojn al tiu komuna granda armeo, kiu sen personaj ambicioj, en plena harmonio, kaj nun ĉiam kreskanta sukceso, pacience laboras jam tiom multe da tempo. Kiel ĝis nun, tiel ankaŭ plue, ni, esperantistoj, iros trankvile nian vojon.

L.-L. ZAMENHOF.



Pregejo "Sto. Domingo," Manila.

USONA ESPERANTISTO EN RUSUJO

ELTIRITA DE "AMERICAN ESPERANTO JOURNAL."

Ne longe post kiam mi eklernis Esperanton mi enskribigis mian nomon en la "adresaron" de D-ro Zamenhof. Tiam komencis fluo de poŝtkartoj el ĉiu parto de la terglobo, kun diversaj petoj (principe por ilustritaj poŝtkartoj) kaj inter ili troviĝis unu de sinjoro en Sud-Rusujo, kiu deziris usonan korespondanton. De poŝtkartoj la afero kreskis je graveco; leterojn eĉ potretojn ni interŝanĝis; la leteroj pli oft- kaj plilongiĝis ĝis kiam, post du jaroj de tia korespondado, mi sentis ke mi havas veran amikon en S-ro Dimitri Vasilievič Speranskij, de vilaĝo Sumi; kaj mi fortege deziris lin vidi.

Tiu deziro estis reciproka, kaj kiam li sciiĝis pri mia intenco viziti la Trian Kongreson, S-ro Speranskij tutkore petegis min daŭrigi mian vojaĝon kaj pasigi someron en lia patrujo. Kompreneble mi iom šance-

Digitized by Google

liĝis, ĉar neniun vorton rusan mi konis; li ne konis unu anglan, kaj mi neniam parolis esperante! Sed li ne volis akcepti rifuzon, kaj sendadis tiajn afablajn leterojn, kun karto de la ĝusta vojo, sciigo pri kosto, k.t.p., ke mi tute ne povis sanceliĝi plu, kaj plezure akceptis lian inviton.

En Kembriĝo mi baldaŭ lernis ke timoj pri mia lerteco kompreni kaj paroli Esperanton estas nenecesaj, ĉar tie mi facile interparolis kun samideanoj de dudek diversaj nacioj. Inter ili estis D-ro Krukowski, de Varsovio, kiu poste helpis min kiam mi alvenis en lian urbon.

Post la Kongreso mi iris Rusujon, ŝargite de malgranda valizo kaj grandega pasporto. Mia vojo estis laŭ Berlino, Varsovio, Kievo ĝis Sumi (proksimume Harkof). Ĉe la landlima urbo Aleksandrov komencis miaj doloroj. Kiom mi soporis pri esperantista tradukisto tie, kaj kiom estas necesa tia homo, ne sole tie sed en ĉiu landima urbo! Multajn sciigojn donis al miaj surdaj oreloj la lukse vestitaj oficistoj pri forpreno de mia pasporto, serĉado de pakajo, elpreno de libroj kaj kiamaniere mi povos repreni pasporton. Se ne okaze ĉeestis fraŭlino kiu komprenis ambaŭ rusan kaj anglan mi nun estus en Alekrandrov serĉante tiun oficiston kiu ŝtelis mian pasporton.

Ĉe Varsovio D-ro Krukowski renkontis min en la stacidomo (kiel ni estis aranĝintaj), kaj veturadis kun mi ĝis alia stacidomo, aĉetis novajn biletojn kaj diversmaniere zorgis pri mia komforto. Plej oportune estis ke li tiun faris, ĉar tiame mi tute nescias ke en Rusujo oni devas aĉeti tri biletojn: unu je la vagonaro, la duan se ĝi estas rapida vagonaro, kaj la trian por permeso al oni sidi!

Vi devas rimarki ke D-ro Krukowski ne komprenas la anglan lingvon; li nur povas paroli pole, ruse, germane, france kaj iom itale. Tial nia interparolado deviĝis esti Esperanta. La longa veturado Kievon fariĝis al mi pli interesa per miaj klopodoj paroli per manoj, kapo kaj eĉ piedoj kun germano kaj ruso kiuj sidis en la sama vagono.

Antaŭ mia foriro S-ro Speranskij estis skribinta ke li certe venigos amikojn en Kievo por helpi min sed, kvankam mi jam ricevis poŝtkarton sciigantan ke la urba grupo estos tre kontenta min ricevi kiel gasto dum mia restado, tamen tiaj sciigoj ŝajnis al mi tro bonaj kaj mi konfesas ke mi ne tute konfidis al ili. Imagu, do, mian ĝojon kaj surprizon kiam, malsuprenirante sur trotuaron mi trovis komitaton da kvin sinjoroj, entuziasmaj esperantistoj kiuj staris pretaj por min saluti kaj konduki min al jam elektita ĉambro en hotelo!

Kaj plie mian ĝojon kiam, post tre bongusta tagmanĝo kun miaj novaj amikoj, mi aŭdis pri la aro da plezuroj kiujn mi havos dum la venontaj du tagoj laŭ ilia gvideco! Mi ne povas, pro manko da spaco, rakonti eĉ la nomojn de ĉiu glora vidajo kiun mi vizitis en tiu urbo, la antikva ĉefurbo de Rusujo, urbo tiel granda kiel Bostono kaj al kiu venas ĉiutage miloj da pilgrimoj. Ĉar Kievo estas la centra urbo de rusa religio ortodoksa kaj tie ĉi troviĝas "La Lavra," granda "St. Peters" de Rusujo. Kiel tradukanto dum bonega koncerto de la Simfonia Orhestro mi havis studenton en Kieva Universitato junulon kiu havas tre radikalajn opiniojn pri politikaj kaj socialoj aferoj. Lia fortega sento pri tiuj aferoj, tiom interesaj kaj tiom diskutataj en lia lando, kaj lia kuraĝo sciigi siajn opiniojn certe altiros al li baldaŭ (mi timas) la atenton de policestro. Mi certe kunsentis tute kun li, kaj tiu unua vespero en stranga urbo, tiuj novaj ideoj de la samideano, la belega muziko, la strangaj uniformoj de Kosakaj oficiroj—ĉiuj faris sur mi neforgeseblan impreson.

Mia vizito al "Lavra," aro de belegaj preĝejoj, granda monahejo kun 2,000 monahoj, okazis la sekvantan tagon kun S-ro Füller kiel tradukisto, kaj unu el la ĉefaj monahoj kiel gvidisto. Mi rimarkis ke kien ajn tiu monaho eniris, aliaj monahoj kisis lian manon kaj pilgrimoj sin jetis teren kaj kisis lian piedon. Li havis tre afablan vizaĝon, longajn orkolorajn harojn kaj tre dolĉan voĉon, sed ŝajnas al mi ke li farus pli bone se li, anstataŭ beni tiujn mizerulojn, vendus la grandegan oran krucon kiun li portis kaj donis al ili por manĝi. Permeson viziti tiujn preĝejojn kaj eniri en la katakombojn (donatan al tre malmulte da fremduloj) mi ŝuldas al la prezidanto de la Kieva Esperanta Grupo, D-ro Kovalevski.

Tre kurioza afero okazis en Kievo. Mi vizitis, kune kun la komitato, la blindlernejon. Bedaŭrinde neniu instruisto aŭ lernanto konis esperanton, sed tamen, dank' al miaj kunuloj, mi lernis multon pri la rusa metodo de instruado al blinduloj. Unu blindulineto kiu tre atente aŭskultis la interparoladon tute surprizis min per demando ĉu mi konas iom pri Fraŭlino Helen Keller? Kiam mi respondis jese, kaj plie ke mi loĝadas proksime al ŝia urbo, la junulino ŝajnis treege ravigita kaj renversis sur mian kapon veran akvegon da demandoj pri ŝia hejma vivo, ŝia eksterajo, sia laboro, k.t.p. Miaj samideanoj devis tre rapide traduki por kontentigi tiun scivolemulinon.

Baldaŭ mi sciiĝis ke unu instruisto jam legis al la klaso la "Rakonto Pri Mia Vivo,"

Digitized by Google

de Fraŭlino Keller, kaj tiu juna knabino, kiu nur havis dektri jarojn, tute enamiĝis je tiu glora usona sur-mut-blindulino kiu antaŭnelonge gajnis tian honoron en Radcliffe'a Universitato. Ŝi petegis ke mi alportu al ŝia heroino malgrandan donacon, kaj do donis al mi bele broditan naztukon kiun ŝi mem kudris. Mi ne devas forlasi tiun rakonton ne rimarkante ke Fraŭlino Keller jam diris al mi kiel ŝi jam skribis germane al la knabino por danki ŝin.

Antaŭ ol mi foriris for Kievo la sindonema "komitato" donacis al mi belegan libron kun vidajoj de ilia urbo, subskribitan de ĉiuj miaj Kievaj amikoj. Ankoraŭ unufoje mi deziras dankegi S-rojn. Sepe, Zedlmajer, Mynko, Majkowski, k.a., pro ilia afableco. La tuta anaro kuniris kun mi ĝis la stacidomo, aĉetis la biletojn, telegrafis al S-ro Speranskij pri la ĝusta horo de mia alveno kaj certigis al mi kiom ili ĝojis mian viziton. Neniam mi povos forgesi ilin. "Ĝis la revido."

Post longa vojaĝo trans la stepoj de Sud-Rusujo mi alvenis Vorojbon kaj tie renkontis min S-ro Speranskij. Tio vere finis mian rusan vojaĝon, ĉar tiu renkonto estis la celo de ĉiuj miaj pensoj dum ses monatoj.

Imagu mian ĝojon! Ni tuj konis unu la alian, kaj post amika saluto ni energie kaj seninterrompe babiladis ĝis kiam nia vagonaro feriris Sumi'on. Pri malkompreno? Neniom! Ĉio estis facile komprenata, eĉ kvankam mia kara amiko havas bedaŭrindan malhelpon je elparolado.

Mia restado en S mi estis treege kontentiga. Tie mi partoprenis en la kutima vivmaniero de mia amiko, tute kiel mi estus ano de lia familio. Estis bonega montrado de vivo de rusa mezaklaso en urbo de 30,000 loĝantoj. Dum mia loĝado mi renkontis nenium kiu povis paroli angle. Efektive la policestro raportis ke mi estas la unua usonano kiu jam eniris en Sumi'on.

Tamen mia interparolado ne estis limigita je S-ro Speranskij, ĉar la tuta familio (escepte lia afabla patrino) povas paroli esperante kaj eĉ ŝi, antaŭ kiam mi foriris, sciis tiom pri: Esperanto kiu nuligis pri la rusa lingvo. Sed S-ro Speranskij estis instruinta al kelkaj junuloj la lingvon, kaj multajn gajajn piknikojn, marŝadojn kaj ludojn ni havis kune: Andreo, Nikolaj (12-jara), Sercoja kaj aliaj kiuj troviĝas en la grup tegrafajo.

La sinjoro kiu sidas je mia maldekstra flanko estas mia mastro; lia frato Paulo sidas apud mi je alia flanko. Ambaŭ sinjoroj estas rimarkinduloj; afablaj, bone edukitaj sinjoroj. Dimitri estas kancelaria oficisto; Paulo, instruisto.

Tiu gaja aro da esperantistoj gastigis min kiel princo per piknikoj, remboatoj, koncertoj, k.t.p., dum mia dusemajna restado en Sumi. Mi ankaŭ pasigis tagon sur granda bieno de S-ro Lintvarev, malproksime tridek kilometrojn, en kamparo, kaj tie mi provis la bonegajn ecojn de diversaj rusaj piroj, pomoj kaj aliaj fruktoj. Pri ilia bongusto mi plenkore povas atesti. Ankaŭ mi pasigis du tagojn ĉe somerdomo de eminenta advokato Smirnov.

Tiu sinjoro, tre glora ĉasisto, estis terure ĉagrenata kiam oni diris ke mi, kvankam usonano, ne estas forta atletulo, ne povas pafi, maĉi tabakon, blasfemi nek trinki! Kiam, do dum tiu interparolado mi min malantaŭenapogis en mia seĝo kaj metis miajn piedojn sur tablo, tiam lia ĝojego estis ridinda. Jen fine neniu dubo pri mia nacieco!

Unu lernanto en altlernejo estis aĉetinta en Germanujo piedpilkon (sferan laŭ angla speco) kaj kelkaj lernantoj petis ke mi instru al ili "la noblan ludon." Tre volonte mi tion faris kiel eble plej bone, per montrado kaj parolado (kompreneble esperanta), sed tial ke mi nesciis la anglan metodon kaj ili ne deziris lerni la usonan, evolviĝis stranga ludo kiu certe troviĝas nenie ajn krom en Sumi. Mi promesis sendi al Sumi la ĝustan regularon tradukitan en Esperanton. Estis ridinde rimarki la surprizon (eĉ teruron) sur vizaĝoj de instruistoj kiam mi partoprenis en knabaj ludoj. Tia interrilato de instruisto kaj lernanto ne estas kutima en Rusujo.

Sed sendube la plej bona parto de mia rusa vizito estis la kvietaj vesperoj kiujn mi pasigis kun Dimitri ĉe lia familio, interparolante, ludante sur fortepiano aŭ per ŝakoj, aŭ aŭskultante dum li tradukis diversajn popolrakontojn. Kiam fine mi devis foriri mi tion faris kun granda malĝojo kaj multaj promesoj ke mi revenos kiel eble plej baldaŭ.

En Kievo mi haltiĝis dum unu feliĉa tago kun la universitataj studentoj Dobszanski Postalenko kaj Mynko. Poste en Varsovio mi restadis du tatgojn kie D-ro Leono Zamenhof (la majstro estis en Ostenlo), D-ro Robin kaj S-ro Niemojevski amike montris al mi ĉiujn vidajojn. Mia amiko Krukowski estis bedaŭrinde malsana. Pro manko da spaco mi ne povas rakonti pri miaj spertadoj en la ĉefurbo de Polujo, la naska urbo de Esperanto, sed mi nur diros ke kiam mi foriris el Rusujo estis post unu tuta ronlo de gasteco kaj afableco de niaj rusaj samideanoj. Vivu Esperanto en Rusujo!

EDWARD K. HARVEY.

Digitized by Google

PROPAGANDA PAGES

"The International Auxiliary Language, Esperanto

By John Mabon Warden, F.F.A., F.B.E.A."

In all ages, since the time of the Tower of Babel, men have experienced much inconvenience whenever they have found it necessary to hold communication with people speaking a di erent language. Even in these modern times of civilization and education, the difficulties which stand in the way of acquiring a single foreign tongue so thoroughly as to be able to use it freely in conversation or correspondence, are so great, that such proficiency can only be the good fortune of the few; and it is always very doubtful whether the time employed in mastering a foreign language, with all its illions, could not have been much better spent.

I wish at the outset to disclaim any idea of laying before you a scheme for a language intended to be spoken by every one on the face of the earth, or even by the civili ed or the European peoples, as their ordinary daily tongue. At di erent times schemes have been propounded for the creation of a philosophic language which should thus supplant existing tongues; but such attempts are utopian. The mother-tongue of every nation must continue to be the medium of intercourse within its borders. The particular scheme to be brought under your notice to-night is simply an *auxiliary* language, calculated to facilitate spoken and written communications between the natives of different countries.

It is needless to enumerate the many advantages that would accrue from the general adoption of some such international medium, as these will be sufficiently obvious. One special use for a neutral language would be found at the international congresses and conferences now so common. Much valuable time could be saved if the speakers were all to employ only one language; but it is evident that such language must be fully international.

During the last few centuries many attempts have been made to solve the problem of an international tongue. In the Middle Ages a kind of international language existed in the shape of Latin, and even afterwards it was the custom to print scientific works in that language. During the last twenty or thirty years there has been great activity in the production of schemes of the kind. Many of these have been of a hopelessly rudimentary or otherwise unsatisfactory character, and quite useless for practical purposes. A few have sought to revive the use of Latin for the object aimed at; but very brief consideration is necessary to appreciate the extreme difficulties in the way of this. Latin is a dead language; its vocabulary entirely lacks the terminology and modes of expression necessary for the modern sciences, arts, and professions; its construction is very complicated, with its endless declensions and conjugations, its ambiguities of meaning, its artificial genders, and its numerous exceptions and irregularities. In order to adapt it for modern everyday use, it would be necessary to introduce such enormous changes and simplifications that practically a new language would have to be created.

* * * *

Esperanto is the invention of Dr. Ludovic Lazarus Zamenhof, an oculist of Warsaw, who was born in 1859, and whose first little book on the subject was published in 1887, not quite twenty years ago. His first idea was to revive one of the classical languages, but he soon saw reason to abandon it. He had realized the fact that the complexity of grammar forms one of the great difficulties, and so he set himself to prepare a simplified grammatical system, being much assisted in this by the comparative simplicity of the grammar of the English language. Next came the problem of a vocabulary—a task whose magnitude rather alarmed him, until he conceived the idea of reducing the number of root-words to a minimum and forming derivatives from each root by the addition of affixes having fixed meanings. One condition only he adhered to strictly—namely that the formation of words in this way should be absolutely regular, without any exceptions. He had observed that in the principal modern languages there exist already a considerable number of international words. These he adopted, and thus

Digitized by Google

he constituted what may be called a Romano-Teutonic vocabulary.

The language was also arranged so as to be available even to persons who might not know or who might never even have heard of it, the whole grammar being practically included in the vocabulary.

Esperanto is accordingly based on two essential principles: (1) the maximum of internationality in the root-words, and (2) the invariability of the elements of the vocabulary, each such element having an independent root and meaning of its own. How these principles are carried out in practice will now appear.

The alphabet contains twenty-eight letters, of which five are vowels and twenty-three consonants. In the selection of these care has been taken to exclude sounds which present difficulties of pronunciation, or which are used only by certain nations: *e.g.*, the two sounds of English represented by the combination *th*, the French nasals, the German "modified" vowels, etc.

The vowels are the ordinary five—A, E, I, O, U. In Esperanto these have the full Italian sounds, which are practically the vowel-sounds of the five English words, *par*, *pear*, *pier*, *pore*, *poor*, and are of medium length. There are no stopped or short vowels. The fact that these five letters, common to all European languages, and representing five sounds also present in each, have been found sufficient for the vowel-sounds wanted in Esperanto, is a strong proof of its simplicity.

The consonants are B, C, Ĉ, D, F, G, Ĝ, H, Ĥ, J, Ĵ, K, L, M, N, P, R, S, Ŝ, T, Ŭ, V, Z. The majority of these are pronounced exactly as in English. The only ones calling for remark are the following:

C, pronounced always like *ts* in *fits*. Our English *c* is a redundant letter, as it represents both *s* and *k*. The Esperanto C has the value which the letter acquired in late Latin, and which it still possesses in some other languages. When it begins an Esperanto word, it is generally followed by E or I, as in CENTRO, CILINDRO, which need no translation; but there are also—CARO = *Tsar*, *Czar*; and COLO = *inch*.

It will be seen that some of the letters have a circumflex accent. This is simply to adapt them to the representation of other sounds.

Ĉ is sounded exactly as our *ch* in *church*: *e.g.*, ĈEKO = *cheque*; ĈENO = *chain*.

Another pair of letters are G and Ĝ. These are simply our hard *g* and soft *g* respectively: as in GANTO = *glove*; GENUO = *knee*; GIMNAZIO = *high school*; ĜARDENO = *garden*; GENTILA = *polite*; ĜOJO = *joy*.

J is used with its German value: as in JARO = *year*; JES = *yes*.

Ĵ represents the French *j*: as in ĵURNALO = *a daily paper*.

S has always the sharp sound of our *ss*, because Z is the representative of the other sound, heard in our *rose*, *ooze*.

Ŝ stands for our *sh*: *e.g.*, ŜIPO = *ship*; ŜOVI = *to push*; ŜUO = *shoe*.

Lastly, Ĥ, though not well known in English, is quite understood by Scotsmen, being the final sound in *loch*. It is of rare occurrence in Esperanto, being used only in words derived from the Greek, as ARĤITEKTO, MONARĤO ĤORO = *choir*.

A separate symbol having been provided for each sound, the system is strictly phonetic, as any new language intended for international use must obviously be. There is no *q*, nor *x*, nor *y*.

Diphthongs are not excluded; but the term, as applied to Esperanto, must be understood to mean monosyllabic diphthongs. There are six such—AJ, EJ, OJ, UJ, formed by adding the consonant J (English *y*) to the preceding vowel, and AŬ, EŬ, where the U is not a vowel, but a consonant having the value of our *w* (consonant). These six sounds are very similar to those heard in the English words—*my*, *cayenne*, *boy*, *hallelujah*, *away*, *wayward*.

When two vowels come together in a word, they are sounded separately, as in—AERO = *air*; GUI = *to enjoy*; SOIFO = *thirst*. Thus, in Esperanto, every word possesses just as many syllables as it has vowels.

The accent, or stress, is always on the second last syllable of a word which is not monosyllabic: *e.g.*, OFICÍRO, GEOGRAFÍO, HIÉRAU.

Like the alphabet, the root-words have been chosen with due regard to the amount of internationality which they possess, and care has been taken to obviate clashing (*e.g.*, MENSO = *the mind*, MONATO = *month*). The author has published a dictionary containing the fundamental root-words, with the meanings in five languages—French, English, German, Russian, Polish. Where two or more languages have a common root, that root is chosen, unless where confusion might result, in the case just indicated. Each root-word represents, not the particular word in any of the five languages, but the fundamental idea expressed by such word, and the principal parts of speech are got by the addition of a vowel, as will appear presently. The dictionary contains only about 2,000 root-words, and it is quite safe to say that any educated person will recognise at least 60 per cent of them at sight. This number,

Digitized by Google

of course, does not include scientific and other technical terms, which are already much more international than words used for ordinary purposes. When such scientific terms are used, they receive the Esperanto orthography and termination.

As illustrating the choice of roots in the dictionary, we have ŝIPO = *ship*, because that agrees with English *ship* and German *schiff*, though not with French *navire*. Some root-words have been so chosen as to harmonise the spoken word of some countries and the written word of others: *e.g.*, GARDENO, in which the written word suggests at once the English *garden* and German *garten*, and the spoken word closely resembles the Italian *giardino* and the French *jardin*.

The grammar of Esperanto is extremely simple, and is comprised in sixteen rules to which there are no exceptions. One feature, not found in any of the national languages, is that the principal parts of speech (noun, adjective, verb, and adverb) are in all circumstances immediately recognisable by their terminations. The vowels play an important part in this matter, each of them fulfilling an invariable function. Thus,

O is the termination of all nouns. Every word consisting of a root with this termination is a noun: *e.g.*, PATRO = *father*.

A is the termination of every adjective, and every word ending in A is an adjective: *e.g.*, BONA = *good*.

E is the termination of derived adverbs: BONE = *well*.

I is the sign of the infinitive of the verb: AMI = *to love*; and

U of the imperative: AMU = *love!*

This arrangement, by which the majority of words end with an open syllable, as in Italian, greatly conduces to euphony.

Two of the consonants also play their part in grammar.

J is the sign of the plural. Added to the -O of the noun, it gives the diphthong -OJ, as in PATROJ = *fathers*; and to the -A of adjectives, -AJ, as in BONAJ = *good* (pl.). We thus have BONAJ PATROJ = *good fathers*, for adjectives always agree in number with their substantives. Note the simplicity of this plural—a diphthong, as compared with, say, the English plural in *s*, which letter is reserved in Esperanto for another purpose.

N marks the accusative case, which in Esperanto is the only case besides the nominative: *e.g.*, BONAN PATRON = *good father* (obj.); BONAJN PATROJN = *good fathers* (obj.). The consonant chosen here is the best that could have been selected, for it interposes no difficulty in the way of commencing a following word. This accusative form is logically used throughout, instead of being confined, as with us, to the personal pronouns. Prepositions do not, as in English, govern the accusative, but the nominative; and therefore the substantive has in such cases the form corresponding to the English form: AL LA PATRO = *to the father*. The accusative also permits a freer order of words in the sentence, and so obviates any rigid rules of construction of phrases.

It is, however, in regard to the verb that the great simplicity and comprehensiveness of Esperanto grammar are found. In addition to the infinitive -I and imperative -U terminations, we have

-AS for the present tense,
-IS for the past tense,
-OS for the future tense, and
-US for the conditional mood.

There is no change in these terminations for person and number; the present tense of the verb *to be* is, MI, CI, LI, SI, ĜI, NI, VI, ILI ESTAS.

This gives us only six forms for tense and mood. To these six participial forms are added, and our verb is complete. The participles are

Time.	*Active.*	*Passive.*
Present	-ANTA	-ATA
Past	-INTA	-ITA
Future	-ONTA	-OTA

In these it will be noted that the first vowel is the same as in the corresponding tense, and the final A is simply the termination of the adjective: AMANTA PATRO = *loving father*; AMATA PATRO = *loved father*.

From these twelve forms of the verb every possible expression can be obtained. Take the active verb TENI *to hold*, coupled with the first personal pronoun, MI. We then have the following type of the verb:

SIMPLE TENSES.

MI TENAS,	TENIS,	TENOS,	TENUS.
I hold,	*held,*	*shall hold,*	*should hold.*

MI TENU. *Let me hold.* TENU! *Hold!*

COMPOUND TENSES.

Active.

MI ESTAS—*I am*
MI ESTIS—*I was*
MI ESTOS—*I shall be*
MI ESTUS—*I should be*
MI ESTU—*Let me be*
ESTU—*Be*

TENANTA—*holding.*
TENINTA—*having-held.*
TENONTA—*going-to hold*

Passive.

MI ESTAS—*I am*
MI ESTIS—*I was*
MI ESTOS—*I shall be*
MI ESTUS—*I should be*
MI ESTU—*Let me be*
ESTU—*Be*

TENATA—*being-held.*
TENITA—*having-been-held.*
TENOTA—*going-to-be-held.*

Digitized by Google

This is the complete type of all the forms that any Esperanto verb can take. (Intransitive verbs, of course, lack the last set of combinations.) The verb ESTI = *to be* is the only auxiliary verb. It will be observed that it replaces the English auxiliary *have*, which is somewhat illogical y used. Esperanto, of course, has the verb HAVI, but this always means *to possess*.

